

Heinrich Heine,
Lorelej'

*tradukita de Leopold
Elb*

Tiu traduko estas poste iom modifita de alioj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.

Heinrich Heine,
Lorelejo

*tradukita de Joachim
Gießner*

Heinrich Heine,
Lurleia

tradukita de N. N. 01

Heinrich Heine,
Lorelej

*tradukita de Ludwig
Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheligas,
Fluadas la Rejn' en trankvil',
La supro de l' monto lumigas
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kronas
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

...

Malgajon mi sentas en koro,
sed kial tia tim'?
Legendo el pratempa foro
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,
kaj malvarmetas l' aer'.
Sed brilas la mont' en orbelo
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, mirige
potenca melodi'.

...

Ignoro, quid id sibi velit,
Tristissimus cur sim,
Antiqui aevi fabellam
Cur saepe volverim.

Vesperascit et frigescit,
Et Rhenus leniter it,
Cacumen montis luccescit,
Dum Phoebus occidit.

Sedet in summo montis
Virgo pulcherrima,
Auro nitet gemma frontis,
Se petit auricoma.

Aureolo pectine pectit,
Carmen canens procul,
Mirandum id habet modum
Nec non virilem simul.

...

Ne scias mi, kial subita malgaj' en la koro naskiĝis;
el tempo jam enterigita legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,
la Rejno mallaŭte babilas,
per oro de l'sun' en vespero
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:
en ora ornamo brilante,
sur supro de l' monto ŝi sidas,
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas
kaj kantas tra l' pura aero,
kaj forto mirinda sin trovas
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

...

<p>Kaj sopiregon eksentastas Ŝipisto dum sia vetur'; Rifaron li ne prientastas, Al monto rigardas linur.</p>	<p>Ŝipiston en eta boato Turmentas koremoci'. Ne ĝenas lin rifo-kaskado, rigardas nur supren al ŝi!</p>	<p>In cymba navitam mille Angores feri tenent, Non videt scopulos ille, Ocli non si sursum vident.</p>	<p>Ŝipet' iras sur la rivero, ŝipisto ektremis de l' kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kantanto.</p>
<p>Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad'.</p>	<p>Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo la ondoj lin kun boat'. Nun kuŝas li en la profundo pro Loreleja kantad'.</p>	<p>Opinor undas devorare Nautam cum navicula, Effecit solo canendo Lurleia id dea.</p>	<p>Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvoturnado; ĝin Lorelej' faris krue-la, per sia mirinda kantado.</p>

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.*

Arg-2-179 (2010-02-11 14:00:52)

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazararo Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mu.ru/kolekto/Lorelej.html>.